

Malnovtestamenta legaĵo:

Dio ordonas en la 13a ĉapitro de la libro de la profeto Jeĥezkel prediki la sekvan:

10 Pro tio, ĝuste pro tio, ke ili erarigas Mian popolon, antaŭdirante pacon, kvankam paco ne estos, kaj kiam la popolo konstruas barilon, ili ŝmiras ĝin per maltaŭga mortero – 11 diru al tiuj, kiuj ŝmiras per maltaŭga mortero, ke ĝi defalos; estos pluvego, kaj vi, ŝtonoj de grandega hajlo, falos sur ĝin, kaj forta vento ĝin krevigos. 12 Kaj jen la muro falis; ĉu oni ne diros al vi: Kie estas la mortero, per kiu vi ŝmiris? 13 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi elpuŝos fortan venton en Mia indigno kaj pluvegon en Mia kolero kaj ŝtonojn de hajlo en Mia furiozo, por ĉion ekstermi. 14 Mi detruos la muron, kiun vi ŝmiris per maltaŭga mortero, Mi disŝutos ĝin sur la teron tiel, ke nudiĝos ĝia fundamento; kaj ĝi disfalos, kaj vi pereos meze de ĝi; kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 15 Kaj Mi plene kontentigos Mian koleron sur la muro, kaj sur tiuj, kiuj ŝmiris ĝin per maltaŭga mortero, kaj Mi diros al vi: Jam ne ekzistas la muro, kaj jam ne ekzistas tiuj, kiuj ŝmiris ĝin. 16 Tiaj estas la profetoj de Izrael, kiuj profetas pri Jerusalemo, kaj predikas al ĝi vizon pri paco, kvankam paco ne estos, diras la Sinjoro, la Eternulo.

Jeĥezkel 13:10-16

Gott befiehlt im 13. Kapitel des Buches des Propheten Hesekiel folgendes zu predigen:

10 Weil sie mein Volk verführen und sagen: »Friede!«, wo doch kein Friede ist, und weil sie, wenn das Volk sich eine Wand baut, sie mit Kalk übertünchen,

11 so sprich zu den Tünchern, die mit Kalk tünchen: »Die Wand wird einfallen!« Denn es wird ein Platzregen kommen und Hagel wie Steine fallen und ein Wirbelwind losbrechen.

12 Siehe, da wird die Wand einfallen. Was gilt's? Dann wird man zu euch sagen: Wo ist nun der Anstrich, den ihr darüber getüncht habt?

13 Darum, so spricht Gott der Herr: Ich will einen Wirbelwind losbrechen lassen in meinem Grimm und einen Platzregen in meinem Zorn und Hagel wie Steine im Grimm, um alles zu vernichten.

14 So will ich die Wand niederreißen, die ihr mit Kalk übertüncht habt, und will sie zu Boden stoßen, dass man ihren Grund sehen soll. Wenn sie fällt, sollt ihr auch darin umkommen. Und ihr sollt erfahren, dass ich der Herr bin.

15 Und ich will meinen ganzen Grimm an der Wand auslassen und an denen, die sie mit Kalk übertüncht haben, und will zu euch sagen: Hier ist weder Wand noch Tüncher.

16 Das sind die Propheten Israels, die Jerusalem weissagen und predigen »Friede!«, wo doch kein Friede ist, spricht Gott der Herr.

La teksto por la prediko estas el la 7a ĉapitro de Mateo. Jesuo admonas siajn auskultantojn:

24 Tial ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kaj plenumas ilin, estos komparata al saĝa viro, kiu konstruis sian domon sur roko; 25 kaj falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj albatis tiun domon, kaj ĝi ne falis; ĉar ĝi estis fondita sur roko. 26 Kaj ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kaj ne plenumas ilin, estos komparata al viro malsaĝa, kiu konstruis sian domon sur la sablo; 27 kaj falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj sin ĵetis sur tiun domon, kaj ĝi falis; kaj granda estis ĝia falo.

Mateo 7:24-27

Der Predigttext steht im siebten Kapitel des Matthäusevangeliums. Jesus ermahnt seine Jünger:

24 Darum, wer diese meine Rede hört und tut sie, der gleicht einem klugen Mann, der sein Haus auf Fels baute.

25 Als nun ein Platzregen fiel und die Wasser kamen und die Winde wehten und stießen an das Haus, fiel es doch nicht ein; denn es war auf Fels gegründet.

26 Und wer diese meine Rede hört und tut sie nicht, der gleicht einem törichten Mann, der sein Haus auf Sand baute.

27 Als nun ein Platzregen fiel und die Wasser kamen und die Winde wehten und stießen an das Haus, da fiel es ein und sein Fall war groß.

Matthäus 7, 24 – 27

Karaj gefratoj en Kristo

Eblas diri, en nuntempaj vortoj, ke la Biblio estas hiperteksto, kie senĉese troviĝas ligiloj al aliaj tekstoj. Estas hodiaŭ la kazo. Kaj helpiloj kiel notoj, paraleloj aŭ konkordancoj estas ĉi tie altvaloraj. Eblas diri ankaŭ en sama kunteksto ke la Biblio estas ĝia propra interpretisto.

Liebe Geschwister in Christus,
man kann – um moderne Worte zu verwenden – sagen, dass die Bibel [so wie das Internet] ein Hypertext sei, in dem sich überall Links, also Verknüpfungen zu anderen Texten befinden. Darum soll es heute gehen. Und Hilfsmittel wie Anmerkungen, Parallelstellen oder Konkordanzen sind hier wertvoll. Man kann im gleichen Zusammenhang auch sagen, dass die Bibel ihr eigener Ausleger ist.

Jen do rakonteto, kiel infankanteto, konstruita kun ripetoj, simetrioj kaj notindaj diferencoj. Ĝin oni muzikigis. Mi lernis ĝin en dimanĉa lernejo, sed ĝi fariĝis popola kanto en Ĉeĥio, sen konscia rilato al la biblia referencaro. Kaj al ĉi tiu himneto estas kunigitaj gestoj.

Ich kenne eine kleine Erzählung, ja ein Kinderlied, das aus vielen Wiederholungen, Ähnlichkeiten und auffälligen Unterschieden besteht. Ich selbst habe es im Kindergottesdienst gelernt, aber in der Tschechei ist daraus - ohne bewussten Bezug auf den biblischen Hintergrund - ein Volkslied geworden. Zu diesem kleinen Lied gibt es auch Gesten.

Du homoj, saĝulo kaj frenezulo. Iel kiel en la parabolo de la dek junulinoj. Tiuj ĉi du homoj konstruas ĉiu sian domon. Apriore la saĝulo kondukas bone kaj la frenezulo malbone.

Zwei Menschen, ein kluger und ein törichter, dummer Mensch, kommen darin vor, ein bisschen so wie im Gleichnis von den 10 Brautjungfern. Diese beiden Menschen

bauen sich jeder ein Haus. Selbstverständlich verhält sich der Kluge gut und der Tor schlecht.

Ni rimarku kelkajn punktojn. Kion mi diros, tio aspektos al vi eble iom senorde, sed ĉi tiu teksto postulas aliron el ĉiuj flankoj.

Wir sollten ein paar Details beachten. Was ich sagen werde, das wird Ihnen womöglich ein wenig ungeordnet erscheinen, aber diesen Text sollte man von allen Seiten betrachten.

Kiel en la rakonto de Jeĥezkel, la pluvo, la torentoj, la vento, estas prezentitaj kiel elprovo, ne en la signifo de io malfacila, dura, sed kiel io kio provas, kio testas, kio kontrolas la solidecon, la efikecon, la verecon.

Wie in der Erzählung bei Hesekiel kommen Regen, eine reißende Flut und Wind als Prüfung, eine Prüfung nicht im Sinne von etwas Schwerem oder Harten, sondern eher im Sinn von etwas, was die Festigkeit, Nützlichkeit oder Wahrheit prüft, testet oder kontrolliert.

La teksto el Jeĥezkel prezentas al ni parabolon por priskribi la sintenon de la ĉefoj de la popolo en la tempo de la profeto. La muro kiun konstruas la popolo ne estas perfekta. Tiam la respondeculoj, la falsaj profetoj ŝmiras ĝin per maltaŭga mortero, per gipso, per kalko. Kiam ili finis, la muro aspektis bela, firma, solida. Venas la elprovo, la torenta pluvo kaj la hajleroj kaj la ŝmiraĵo estas forigita, kaj la muro mem estas renversita. Kaj eĉ la fundamento estas makovrita kaj detruita. Jen bildo pri la sorto kiu atingos la popolon kaj ĝiajn respondeculojn, pro tio ke ili ne volis aŭskulti la Sinjoron kaj liajn profetojn.

Hesekiels Text stellt uns gleichnishaft das Verhalten der Obersten im Volk in der Zeit des Propheten dar. Die Mauer, die das Volk baut, ist mangelhaft. Dann lassen die Verantwortlichen, die falschen Propheten diese mangelhafte Mauer mit untauglichem Mörtel, mit Gips und Kalk verputzen.

Am Ende schien die Mauer schön, stark und fest. Aber als die Prüfung kommt, der Platzregen und der Hagel, fällt der Putz herunter und die Mauer stürzt ein. Und sogar das Fundament wird aufgedeckt und zerstört. Das ist ein Bild für das Schicksal, das das Volk und seine Führung treffen wird, weil sie nicht auf Gott, den HERRN und seine Propheten hören wollten.

La aŭskultantoj de Jesuo kaj la legantoj de Mateo tre certe konas tiun ĉi pecon kaj rapide faras la ligon. Neniu bezono por ili alklaki.

Jesu Hörer und die Leser des Matthäus kannten diese Verse bei Hesekiel ganz sicher und verknüpften sie mit Jesu Worten vom Haus im heutigen Evangelium. Sie brauchten also – modern gesprochen – den Link gar nicht anklicken, um zu verstehen.

Tie ĉi oni parolas pri konstruado de domo. Kiam temas pri konstruado, tuj tiu ĉi vorto aperas subskribita kaj celas al la Psalmo 127 :

Se la Eternulo ne konstruas la domon, Tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj; Se la Eternulo ne gardas urbon, Tiam vane maldormas la gardanto. Vane vi frue leviĝas, malfrue sidas, Manĝas panon kun klopodoj: Al Sia amato Li donas en dormo.

Tiel prezentiĝas jam bona ideo pri kio estas bona konstruaĵo. Estas tiu, kiun Dio mem konstruas.

Es geht also um den Bau eines Hauses. Wenn es in der Bibel ums Hausbauen geht, erscheint da sofort wieder einen Link, der diesmal auf Psalm 127 verweist:

1 ... Wenn der Herr nicht das Haus baut, so arbeiten umsonst, die daran bauen. Wenn der Herr nicht die Stadt behütet, so wacht der Wächter umsonst.

2 Es ist umsonst, dass ihr früh aufsteht und hernach lange sitzt und esset euer Brot mit Sorgen; denn seinen Freunden gibt er es im Schlaf.

Hier zeigt sich, was ein gutes Bauwerk ausmacht. Ein gutes Bauwerk ist das, das Gott selbst baut.

Kaj la sinteno de la saĝulo plusendas tuj la leganton, la aŭskultanton al peco en Jesaja, ĉapitro 28 : *Pro tio tiele diris la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi por fundamento kuŝigas ŝtonon en Cion, ŝtonon elproviditan, bazangulan, valoregan, fortikigitan fundamenton; la fidanto ne maltrankviliĝu. Kaj Mi faros justecon la mezurŝnuro, kaj veron la vertikalo; kaj hajlo forbatos la rifuĝejon de mensogo, kaj la kaŝejon forportos akvo.*

Die Verhalten des Klugen schickt den Leser, den Zuhörer gleich weiter zu einer Stelle bei Jesaja im Kapitel 28:

*16 Darum spricht Gott der Herr: **Siehe, ich lege in Zion einen Grundstein, einen bewährten Stein, einen kostbaren Eckstein, der fest gegründet ist. Wer glaubt, der flieht nicht.***

17 Und ich will das Recht zur Richtschnur und die Gerechtigkeit zur Waage machen. So wird Hagel die Zuflucht in der Lüge zerschlagen, und Wasser sollen den Schutz wegschwemmen.

Ĉi tie troviĝas jam la fundamento, sur ŝtono, sur roko, kaj ankaŭ la minacantaj elementoj, hajlo kaj akvo por elprovi la konstruaĵon. Sed ankaŭ troviĝas io, kion reprenos la Nova Testamento, la bazangula ŝtono. Bazangula ŝtono retrovebla ankaŭ en la 118a psalmo : *Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, Fariĝis ŝtono bazangula.*

Kaj kiam mi plue alklakas tiun ĉi hipertekston, kiu estas la Biblio, mi alvenas al Agoj 4 : *Tiu estas la ŝtono, kiun vi konstruantoj malŝatis, kaj kiu fariĝis ŝtono bazangula.* Tie, temas pri Jesuo.

Hier findet man wie im Evangelium das Fundament auf einem Stein bzw. Felsen und auch die bedrohlichen Gewalten, Hagel und Wasser vor, die das Gebäude prüfen. Und es gibt noch etwas, was das Neue Testament dann aufgreifen wird, den Eckstein. Den Begriff Eckstein finden wir auch im Psalm 118, Vers 22: **Der Stein, den die Bauleute verworfen haben, ist zum Eckstein geworden.**

Und wenn ich nun diesen Hypertext, diesen Link in der Bibel, anklicke, komme ich in die Apostelgeschichte, Kapitel 4, 11: Dort heißt es von Jesus: *Das ist der Stein, von euch Bauleuten verworfen, der zum Eckstein geworden ist.*

Precizigon plie alportas tiu peco de Paŭlo en la epistolo al la Efesanoj, ĉapitro 2 : *Sekve vi jam estas ne fremduloj kaj pasloĝantoj, sed samregnanoj kun la sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio, konstruitaj sur la fundamento de la apostoloj kaj profetoj, kies bazangula ŝtono estas*

Kristo Jesuo mem; en kiu ĉiu aparta konstruaĵo, bone kunigita, kreske fariĝas sankta templo en Kristo; en kiu vi ankaŭ estas kunkonstruitaj por sanktejo de Dio en la Spirito.

La fundamenton de la domo de Dio konsistigas la apostoloj kaj la profetoj, tio estas la atesto de la apostoloj kaj profetoj, tio estas la Skriboj. Sed la peco precizigas plie ke la bazangula ŝtono estas Jesuo Kristo, ankoraŭfoje.

Noch genauer kann man das im Blick auf folgende Bibelstelle im Brief des Paulus an die Epheser im zweiten Kapitel verstehen:

19 So seid ihr nun nicht mehr Gäste und Fremdlinge, sondern Mitbürger der Heiligen und Gottes Hausgenossen,

20 erbaut auf den Grund der Apostel und Propheten, da Jesus Christus der Eckstein ist,

21 auf welchem der ganze Bau ineinandergefügt wächst zu einem heiligen Tempel in dem Herrn.

22 Durch ihn werdet auch ihr mit erbaut zu einer Wohnung Gottes im Geist.

Das Fundament des Hauses Gottes stellen die Apostel und Propheten dar, das heißt das Zeugnis der Apostel und Propheten, also die Schriften der Bibel. Aber diese Bibelstelle unterstreicht noch einmal, dass Jesus Christus der Eckstein ist.

Post zapado de versiklo al versiklo, de ligilo al ligilo, ni tuj revenas al niaj kvar versikloj, sed vi povos konstati kiu tiuj devojiĝoj ne estis senutilaj.

Nach diesem Springen von Vers zu Vers, von Link zu Link kommen wir jetzt gleich zu unseren vier Versen des Predigttextes zurück, aber Sie werden feststellen können, dass diese Umwege nicht sinnlos waren.

La slogano de la Reformacio, *Sola Scriptura*, rememorigas nin ke la fundamento sur kiun konstruiĝas la Eklezio, la vivo de ĉiu kristano, tio estas la atesto de la apostoloj kaj profetoj, tio estas la Skriboj, sed la Skriboj en tio ke ili montras al la bazangula ŝtono, al Jesuo Kristo. Same sur konata bildo Wycliff estas prezentita kiel la fajrilo, Jan Hus kiel la meĉo kaj Martin Luther kiel brulanta torĉo: ili estas tiuj kiuj permesis al ĉiu ajn aliri por si mem al tiu fundamento, sin apogi al tiu ĉi roko kaj konstrui sur firman rokon.

Das Motto der Reformation „Sola Scriptura“, allein die Schrift, erinnert uns daran, dass das Fundament, auf dem die Kirche, auf dem das Leben eines jeden Christen gebaut ist, das Zeugnis der Propheten und Apostel ist, d. h. die Schriften der Bibel, aber in dem Sinn, dass die Schriften auf den Eckstein hinweisen, auf Jesus Christus. Daher werden auf einem bekannten Bild der englische Reformator Wycliff als Feuerstein, der tschechische Reformator Johannes Hus als Docht und Martin Luther als brennende Fackel dargestellt, weil sie diejenigen waren, die jedem ermöglichten, selbst zu diesem Fundament zu kommen, sich auf diesen Fels zu stützen und auf diesen festen Felsen zu bauen.

Komentario de Luther pri tiu peco komparas tiujn kiuj baziĝas sur sablo kun tiuj kiuj konstruas al si memfaritan sanktecon, konstruitan sur iliajn proprajn agadojn, sur ilian devotecon aŭ iliajn intencojn, sed konas nenion pri Kristo. Li parolis pri la tiuepokaj monaĥoj, sed tio validas ankaŭ ĝenerale. Pretendi fabriki sian savon, brikoli siajn valorojn, serĉi meritojn, ĉio ĉi tio estas same vana kiel konstrui sur sablon, kaj ne eltenos la elprovojn de la vivo, ne pli efike ol la ŝmiraĵo de maltaŭga mortero al la mureto de Jeĥezkel. Nur la servisto de la Markizino diras ke ĉio iras glate, eĉ se ne estas vera.

Ein Kommentar Luthers zu dieser Stelle vergleicht die, die auf Sand gebaut haben, mit denen, die sich eine selbst gemachte Heiligkeit bauen, erbaut aus ihren eigenen Werken, ihrer Frömmigkeit und ihren guten Absichten, die aber nichts von Christus wissen. Er meint damit die Mönche seiner Zeit, aber das gilt auch allgemein. Sich anzumaßen, sein Heil selbst zu erarbeiten, sich seine Schätze zu basteln und sich bei Gott Verdienste zu suchen, das alles ist genauso vergeblich, wie auf Sand zu bauen und das wird die Prüfungen des Lebens nicht besser bestehen, als der bereits erwähnte schlechte Mörtelputz auf der Mauer des Hesekiel. Nur der Lakai eines Fürsten würde behaupten, alles sei in bester Ordnung, selbst wenn es nicht wahr wäre.

Niaj kvar versikloj respondas unu al la aliaj preskaŭ perfekte. Nur kelkaj vortoj modifas la du duonojn. Sablo kaj roko. La falanta kaj la nefalanta domo, la saĝulo kaj la malsaĝulo.

Unsere vier Predigtverse sind fast perfekt miteinander verwoben. Nur wenige Worte bestimmen beide Seiten: Sand und Fels; das einstürzende und das nicht einstürzende Haus, der Kluge und der Tor.

Mi kromnotos aliajn diferencojn.

La verboj aŭdi kaj fari, aŭdi la parolojn de Jesuo kaj fari ilin (diversmaniere tradukita plenumi aŭ praktikigi) ne estas en la sama gramatika modo en la du partoj. Kaj en tio mi vidas signifon. En la unua parto de la diptiko, tiu de la saĝulo, tiuj verboj estas en indikativa modo : temas pri agado, intenco, pozitiva agado. Tiu ĉi vere aŭdas, aŭskultas atente, kaj li faras vere, efektivas la parolojn, realigas ilin.

Ich möchte noch auf andere Unterschiede hinweisen:

Die Worte „hören“ und „tun“, also Jesu Rede zu hören und sie zu tun (anders übersetzt auch sie zu erfüllen oder zu praktizieren) stehen auf beiden Seiten nicht dem selben, grammatischen Modus. Und das hat meiner Meinung nach eine Bedeutung. Zuerst, als es um das Verhalten des Klugen geht, stehen die Verben im Modus des Indikativ: es geht ums Handeln, die Absicht, um positives Handeln. Dieser hört wirklich, hört aufmerksam zu und tut wirklich etwas, setzt die Rede Jesu um, realisiert sie.

Kontraŭe en la dua bildo de la sama diptiko, tiu de la malsaĝulo, la verboj estas en participa modo. Iamaniere li pasivas, li aŭdas sen aŭskulti, pasante, distre, sen intenco, sen streĉo, kaj sekve ne faras, ne agas, ne realigas, ne plenumas tiujn parolojn. Li ne troviĝas ĉi tie. Li rigardas aliloken, li aŭskultas aliloken, li agas aliamaniere.

Im Gegensatz dazu stehen in der zweiten Hälfte dort, wo es um den Toren geht, die Verben als Partizipien. Er ist irgendwie passiv, er hört ohne zu handeln, oberflächlich, zerstreut, ohne etwas tun zu wollen, ohne sich Mühe zu geben und folglich tut, macht, realisiert und erfüllt er Jesu Rede nicht. Er ist gar nicht richtig da, schaut weg, er hört auf anderes, er handelt anders.

Estas alia diferenco kiu kondukas al la sama ideo kaj kiun la tradukoj ne ĉiam redonas. Ne estas la sama verbo kiu estas uzata por priskribi la agadon de la elementoj.

La unua verbo povas estis tradukita per *sin ĵetis*, kaj eĉ portas la signifon (*ador-*)*kliniĝi*. La elementoj devas strebi por ataki tiun ĉi domon konstruitan sur la roko, sed ili devas kapitulacii, eĉ kliniĝi antaŭ tiu ĉi domo kaj antaŭ la roko.

Es gibt noch einen anderen Unterschied, der das gleiche unterstreicht, den Übersetzungen aber nicht immer wiedergeben. Um das Treiben der Gewalten zu

beschreiben, wird nicht in beiden Hälften das gleiche Verb verwendet. Das Verb in der erste Hälfte könnte man mit „sich werfen auf“ übersetzen und manchmal hat es sogar die Bedeutung von „sich vor jemandem anbetend niederwerfen“. Die Gewalten müssen dieses auf dem Felsen erbaute Haus bewusst angreifen, müssen aber kapitulieren, ja sich sogar vor diesem Haus und dem Felsen niederwerfen.

La alia atako aspektas malpli intenca. Eblas diri ke la senbridaj elementoj frapiĝas kontraŭ la domo, aŭ eĉ ili stumbas sur ĝi. Ŝajne, ĝi ne estis celita. Sed ĝi ne eltenis. Ĝi preskaŭ detruigis de si mem, ne estinte bone konstruita. Iamaniere, la elementoj detruis ĝin malatente. Ups !

Der Angriff auf das Haus auf dem Sand scheint eher unabsichtlich zu sein. Man könnte sagen, dass die zügellosen Gewalten einfach so gegen das Haus stoßen oder stolpern. Scheinbar war es gar nicht absichtlich. Aber das Haus hält es nicht aus, bricht fast wie von selbst zusammen, weil es nicht gut gebaut worden war. Irgendwie haben die Gewalten es versehentlich zerstört, o pardon!

Kion reteni el tiuj versikloj, klarigite per aliaj versikloj ?

Unue, konstrui sian vivon sur la rokon, sur la ateston de la apostoloj kaj de la profetoj, sur la Sbribojn, kiuj parolas al ni pri Jesuo Kristo, kaj ne malatente, ne sur niajn bonajn intencojn, nian racion, ne nur aŭdi aktive sed ankaŭ praktiki, plenumi, fari kaj vivi ĉi tiujn parolojn.

Was sollte man sich aus diesen Versen, die von anderen Versen erklärt wurden, merken?

Zum einen, dass man sein Leben auf diesen Felsen bauen sollte, auf dem Zeugnis der Apostel und Propheten, auf die Schriften der Bibel, die zu uns von Jesus Christus sprechen, und dass wir unser Leben nicht unaufmerksam, nicht auf unseren guten Absichten, nicht auf unseren Verstand bauen sollen, dass wir die Worte Jesu nicht nur aktiv hören, sondern auch praktizieren, erfüllen, tun und leben sollen.

Kaj ankaŭ ne timi la elprovon. La tento estas la sama vorto, ofte miskomprenata. Tiu, kiu konstruis sur la rokon, ne timas la elementojn kiu elprovas foje forte la solidecon de la konstruaĵo.

Und auch, dass wir Prüfungen nicht fürchten müssen. „Prüfung“ und „Versuchung“ sind biblisch das selbe, oft missverstandene Wort. Der, der auf den Felsen baute, fürchtet die Gewalten nicht, die die Tragfähigkeit des Bauwerkes manchmal stark prüfen.

Mi finos per citaĵo de la apostolo Petro, kiu citis Jesajan : *Jen Mi kuŝigas en Cion bazangulan ŝtonon, elektitan, valoregan; Kaj kiu lin fidas, tiu ne estos hontigita.*

Ich schließe mit einem Zitat des Apostels Petrus, der wiederum den Propheten Jesaja zitiert: *Siehe, ich lege in Zion einen auserwählten, kostbaren Eckstein; und wer an ihn glaubt, der soll nicht zuschanden werden.* (1. Petrus 2, 6)

Und der Friede Gottes, welcher höher ist als alle Vernunft, bewahre eure Herzen und sinne in Christus Jesus.

Amen

EG 369 Wer nur den lieben Gott / AD 507 Se nur al Dio vi konfidas